**Praha-ek-1958-51-01**



No 51. Septembro 1958

aperas laŭbezone
pri la enhavo respondas
Jiří Havlík, Plamínkové č. 12
Praha 7, t. 736-37

Karaj legantoj,

dum lastaj monatoj via informilo ne aperis. Multaj, vere tre multaj, demandelteroj, speciale el Sovetunio, asertas nin pri la grava rolo, kiun tiu ĉi modesta kluba cirkulero ludis.

De marto 1953 ĝi celis kontribui la mondpacon.

Post la nova reorganizo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, nome post la konstituiĝo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato (ĈsEK – D-ro Jaromír Jermář – prezidanto, Adolf Malík –sekretario; adreso: Blanická 4, Praha 12) informoj pri tutŝtataj E-aferoj estos publikigitaj en cirkulero de ĈsEK „Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato“.

Nia BULTENO plenumis tiel sian taskon, iu ofte estis pli granda ol la ekzistintaj materialaj rimedoj. De nun ĝi daŭros aperadi kiel kutima kluba cirkulero kun informoj por nia membraro.

Laŭ interkonsento de nia klubo kun la prezidanto de ĈsEK D-ro Jeřmář, per certa tempo la ĝisnunaj legantoj de la Bulteno de EK ĉe OB2 en Praha senkoste ricevados ankaŭ la novan organon de ĈsEK.

Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj subtenos nian laboron ankaŭ en la estonteco.

ESPERANTISTA KLUBO ĉe OB2
PRAHA

A. Slanina v. r. J. Havlík v.r.

**Praha-ek-1958-51-02**



Venonta Universala Kongreso okazos en Varsovio. El Ĉeĥoslovakio estos aranĝata karavano. Verŝajne en Praha okazos „Antaŭkongreso“.

En Pola kultura centro, Praha 3, Václavské náměstí, vi povas ricevi ĉiujn esperantaĵojn eldonatajn en Polujo, inklusive gazeton POLA ESPERANTISTO, bele presitan, kun riĉa enhavo.

Librovendejo KNIHA (Orbis), Václavské nám., havas specialan fakon por fremdlingva litraturo, kie oni povas aĉeti aŭ mendi Esperanto-literaturon. Estas eldonita multobligita cirkulero, speciale dediĉita al esperanta literaturo aĉetebla en tiu ĉi vendejo.

Osvětová Beseda, Praha II. Lucerna, aranĝas ESPERANTO KURSOJN. Interesuloj anoncu vin ĉe „Osvětová Beseda“. Propagandu la kursojn inter viaj konvoj!

ESPERANTO EN UNO.
Du kursojn pri Esperanto starigis ĉe la Unuigintaj Nacioj antaŭ nelonge tri oficistoj tieaj, nome: s-roj Kersaudy el Francio, Piron el Belgio kaj Svane el Danlando. Ambaŭ kursoj daŭros ok semajnojn.

ZAMENHOF-MONUMENTO estis inaŭgurita en Vieno la 27-an de Jul. 1958.

Laŭ informoj el Pollando, la kompetentaj instancoj decidis eldoni, okaze de Zamenhof-jaro, jubileajn poŝtmarkojn.

Aperis la kvara numero EL POPOLA ĈINIO. Krom interesaj artikoloj ĝi enhavas kurson de Ĉina lingvo. Kiu interesiĝas pri fama ĉina <u>kuirarto,</u> certe estos kontentigita per receptoj de ĉina kuirejo. Oni povas aboni la gazeton pere de ORBIS, Stalinova str. Praha XII.

KLUBA BIBLIOTEKO estos translokigita en klubejon, kie ĉiu membro povos dum la kluba kuneno pruntepreni la librojn kaj ankaŭ gazetojn.

Apogu nian klubon per libervola monhelpo. Respektu vian devon kiel Esperantisto; nur organizataj ni povas labori <u>efike.</u> Rapide alproksimiĝas Jubilea Jaro, centjara datreveno de naskiĝo de nia Majstro L. L. Zamenhof. Ni aktivigu nin! Do, ek al laboro!

Niajn legantojn kaj membrojn ni atentigas pri nia <u>nova</u> adreso:
ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA
ĉe Osvětová Beseda Praha II.,
Ve Smečkách 36

por korespondi: Dlouhá 10, Praha I.

**Praha-ek-1958-51-03**



ESPERANTO-TENDAROJ EN USSR.
La junulara esperantista grupo „Fajrero“ en Moskva estas nun la plej vigla esp-ista grupo en la ĉefurbo. 150 – 200 ĉeestantoj en la kunvenoj estas normala afero. Venas vizite ankaŭ eksterlandaj gastoj, inter ili la vietnama ambasadoro, kiu estas aktiva esperantisto. 2-an de majo la fajreranoj kunvenis sur la iluminita Ruĝa plac opor kanti kaj danci. Superŝutis ilin demandoj de aliaj festantoj: kiel ankaŭ ni povus ellerni Esperanton? La 10-an de majo, vesperfesto, preparita de la dramrondeto, 250 rigardantoj ĝuis precipe teatraĵon „La grava kunsido“ de F. Szilágyi kaj anekdotou-miniaturojn. Okaze de la Tago de l´Soveta Junularo (29.6.) la grupo ricevis multajn gratulojn el la eksterlando. Por pliperfektigi la grupanojn en la lingvo oni formis konversaciajn rondetojn kaj aranĝis unuafoje du somerajn Esperanto-tendarojn en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Moskva (5.-15.7. kaj 11. – 25.8.). La programo estis simila kiel en la ĉeĥosl. SET. La junaj esperantisto jel ČSR volonte transdonis al la moskvanoj siajn multjarajn spertojn en tiu rilato. Por 1959 Fajrero organizos pli grandskalan tendaron.

(Gšg – jm.)

D-ro Augustin PITLÍK – 75-jara.

Kun surprizo ni konstatas, ke nia ĉiam vigla membro D-ro Augustin Pitlík atingis la 24-an de julio nunjara sian 75-an jaron. Li estas ekde la plej malnovaj tempoj de ni memoreblaj inter ni, lerninte Esperanton en 1901 kaj dum 57 jaroj fidele portinte la torĉon.
Lia nomo kaj persono aperas ĉe plej diversaj okazoj gravaj por progreso de nia afero. En 1921 li estis ĝenerala sekretario de Universala Kongreso de Esperanto en Praha. Estis kongreso brile sukcesinta kaj unu el la plej grandaj. Jam antaŭe en 1912-1913 li travojaĝis 11 eŭropajn ŝtatojn, parolinte ĉie en Esperanto pri Praha kaj pri la ĉeĥa gimnasta organizo Sokol.
En Ĉeĥoslovaka Esperanto-organizo li plenumis diversajn altajn funkciojn. Dum pluraj jaroj li estis ankaŭ Esperanto-lektoro en la Alta teknika lernejo de Praha kaj membro de la ŝtata ekzamena komisiono por Esperanto, post la dua mondmilito gvidanto de la Somera Esperanto-Kolegio en Doksy. Li estas membro de Akademio kaj honora membro de UEA. La franca kaj la finna registaroj honoris lin por ordenoj.
Ni salutas nian karan membron D-ron Pitlík kore kaj ĝojas, ke li ofte aperados inter ni en daŭra sano kaj viglo.

O. G.

VENAS NOVA VENTO.

Tiu ĉi numero de Bulteno, provizore kompilita en novaj cirkostancoj fakte malfermas novan epokon ne nur de la klubo mem. Novan venton oni sentas en ĉiuj flankoj de nia movado. Jam funkcias nia Ĉeĥoslovaka ESPERANTO-komitato, je kies konstituiĝo ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj dum kelkaj jaroj sopiris.

**Praha-ek-1958-51-04**



Fine estis denove atingita oficiala rekono de esperantisto flanke de nia ŝtato. Certe la ĉefan rolon tiurilate ludis nia malnova tradicio de porpaca agado. Kun brilega sukceso finiĝis la 43-a Universala Kongreso de Esperanto en Majenco, rekonita de tieaj aŭtoritatoj. Kaj nun staras ni antaŭ grava tasko: kune kun niaj samideanoj en la tuta mondo prepari indan feston de la centjara naskiĝdatreveno de nia Majstro. Dum la venonta Jubilea Jaro, jaro de la Kongreso en Varsovio, kiu okazos sub protektoreco de k-do Cyrankiewicz, prezidanto de Pola registaro, estos nia devo ankaŭ en nia lando eluzi tiun grandan oportunon por nia afero. Krom persona vigleco de multaj niaj samideanoj, kiuj estéte konservis nian aferon dum jaroj de diversaj malhelpaĵoj, estos dum tiu ĉi nova epoko de oficialigo bezonataj pli da konsento kaj praktika kunlaboro, por ke nia penado estu ne nur bone intencata, sed ankaŭ samtempe laŭleĝa, firme bazita sur nia politiko-ekonomia strukturo. Tia estas la ĉefa kondiĉo de nia venonta sukceso.

En la vicoj de OB Praha II., nia klubo havas bonegan eblecon de praktika uzado kaj propagando de la lingvo kaj paca ideo.

Ekzistinta sub tiu ĉi tegmento, la klubo atingis multan sukceson: malgraŭ la obstakloj ni kreskis, ĉiam kreskas kaj verŝajne kreskos senĉese. Nia fama teatra grupo „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ rikoltas plenmeritajn aplaŭdojn inter esperantistaro de tuta respubliko. Sed tamen – ĉu niaj forte kaj niaj rezultuj vere sufiĉos? Hodiaŭ – eble jes; sed morgaŭ…? Jam dum la somera sezono, kiam vizitadis nian rondon multaj eksterlandanoj – ĉiuj vizitas nian ĉefurbon – oni vidis, ke la zorgo pri tiuj niaj samideanoj restis sur plenpezigitaj ŝultroj de kelkaj oferemaj unuopuloj. Ĉu tiu bedaŭrinda stato povos resti ankaŭ dum la Jubilea Jrao? Evidente ne. Sed ni serĉu rimedojn ne tro malfrue! Venonte ni devas efike, tio signifas komune labori. Pro tio ni konservas nian Bultenon, ke ĝi estu forta ligilo ankaŭ kun tiuj niaj membroj kaj amikoj, kiuj ne povas nin vizitadi, sed tamen povas esti aktivaj. Ĝi havos pli laboreman karakteron, pli malmulte da paĝoj, bezonos pli da kunlaborantoj, aperados pli ofte ol ĝis nun. La estraranoj de nia klubo atendas ankaŭ vian helpon je tiu ĉi efekto. Ne forgesu: ili bezonas vin, vi bezonas ilin. Ni ĉiuj devas helpi unu la alian.

JMH

VENU INTER NIN! Vi ellernis Esperanton kaj vi fariĝis membro de nia E-klubo. Nia klubo estas multnombra, sed fakte ni devas konstati, ke nur kvinto de nia anaro vizitas la klubon – kaj ĉiam la samaj homoj. Kie estas vi, la ceteraj? Ĉu vi ne plu ŝatas paroli Internacian lingvon? Ĉu vi ne volas aktive kunlabori?

Nian klubon ĉiumerkrede vizitas eksterlandanoj. En lasta tempo ni vizitis dekdu Svisoj, dekunu Poloj, gesamideanoj el Sovetio, Svedujo, Britujo, Francujo, Bulgario, Italujo, Ĉinio, Nederlando, ktp. Venu, ni atendas vin! Ni kunvenadas je la 20-a horo en ejo de „Malá scéna“, Ve Smečkách 26, Praha II.

A. Slanina
vicprezidanto